

La Esperanto-Gironde Informilo

SEPTEMBRO 2024

N° 176

# Mildaj aŭtunaj ciklamenoj



**ESPERANTO-GIRONDE**  
**ASSEMBLEE GENERALE**  
**Maison de quartier Pessac Bourg à PESSAC**  
**le 07 avril 2024 à 10h30**

*Raportis Janine*

**P**résents ou représentés : Jean-Seb Brilleaud, Luca Buselli, Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Martine Edelbloude (pouvoir à Claudine Pomiro), Gloria Gargallo, Hervé Giranton, Katya Gradzion, Joël Lajus, Lucienne Laroche, Samson Ligan (de Marmande), Olivier Moreno, Marie-Thérèse Lloancy (pouvoir à Janine Dumoulin), Claudine Pomiro, Marcel Redoulez, Eric Tiffon, Fernando Torres.

Excusés : Domingos Martins, Bernard Sarlandie, Rose Sarlandie, Jean-François Seylier.

### **1. Rapport d'activité**

Année 2023 :

- LEGI : sont parus 4 numéros : 170 à 173.
- Réunions : Il y a eu 7 réunions :
  - 22 janvier à la salle Simone Signoret
  - 19 février à la salle Simone Signoret
  - 23 avril à la salle Simone Signoret
  - 11 juin à la Maison de quartier Pessac Bourg
  - 24 septembre à Cambes
  - 25 novembre à Montendre (AG 2023)
  - 9 décembre : Zamenhof-Tago à Saint-Genès de Lombaud
- Nous avons déploré la disparition de Michel Lavergne le 06 mai et celle de Monique Assailly le 30 juillet.
- Activités et événements :
  - Les cours du lundi se sont déroulés à partir de là à la Médiathèque de Cenon (5 participants).
  - Il y avait deux étudiants pour le cours d'espéranto à l'université en 2022-2023, il y en a cinq en 2023-2024.
  - Le groupe de Galgon a été dissous début 2023.
  - Marcel et Claudine ont participé au congrès de SAT à Grésillon.



- Bernard et Rose ont participé au congrès universel à Turin.
- Le siège de l'association est désormais à Pessac, ce qui permet de tenir les réunions à la Maison de quartier de Pessac Bourg.
- Le projet Brassens est presque arrivé à son terme ; Universal, Wagner et Flammarion ont été payés. On peut se lancer dans l'impression.
- Le site internet a été mis à jour et est tenu par Eric et Domingos.
- Infolettre mensuelle d'Espéranto-Gironde par Domingos.
- Participation de Gloria, Marcel et Claudine aux cours du Groupe Entre-deux-Mers d'Espéranto (à St-Genès de Lombaud).
- Après l'élection de Yannick au poste de trésorier, le compte Crédit Agricole de Bordeaux a été fermé et un compte a été ouvert au Crédit Agricole de Montendre.
- Rendez-vous mensuels, le 4<sup>ème</sup> jeudi du mois, au café associatif Le Petit grain.

Le rapport d'activité est approuvé à l'unanimité

## 2. Rapport financier

**Yannick** : Compte courant : Au 31 décembre 2023 : 2748,98 € + liquide : 104,17 €  
Soit un déficit de 501,83 €.

Livret A : Au 31 décembre 2023 : 3187,66 €

Parts sociales : 30 €

**Recettes : 1087,54 €**

- Reliquat groupe de Gujan Mestras : 694,52 €
- Cotisations : 127 €
- Adhésion aux Kompanoj : 175 €
- Intérêts Livret A : 90,33 €
- Intérêts Parts sociales : 0,69 €

**Dépenses : 1589,42 €**

- Versement du reliquat de Gujan Mestras à une association malgache : 694,52 €
- Ulzama (imprimeur) : 469,24 €
- Droits Warner : 250,80 €
- Location salle Pessac : 100 €
- Location de nom de domaine (OVH) : 8,39 €
- Frais postaux (LEGI) : 32,72 €
- Frais bancaires : 3,85 €
- Don à Espéranto-France (calendriers) : 30 €

Au 31 mars 2024 :

- Compte courant : 2689,33 €
- Livret A (Montendre) : 3500 €
- Liquide : 24 €
- Parts sociales (nouvelles, à Montendre) : 45 €

Il reste 94 timbres-poste. Les trois derniers numéros de LEGI n'ont pas été expédiés. La liste comporte six ou sept adresses.

Le rapport financier est approuvé à l'unanimité

### 3. Projets

#### • LEGI

Deux numéros sont parus depuis janvier : 174 et 175.

#### • Réunions :

Deux réunions ont eu lieu :

- 21 janvier à Pessac

- 10 mars à Pessac

#### • Film *Nous n'avons pas peur des ruines* :

Traduction en espéranto des sous-titres dès que le film sera définitif.

#### • Travail avec Christian Leduc :

En janvier, traduction de la chanson *Que sera demain ?*

Christian Leduc souhaite que nous traduisions d'autres de ses chansons pour les chanter en espéranto. Et les enregistrer. Marcel et Claudine le rencontreront à Saint-Macaire les 11 avril.

Joël propose qu'Espéranto-Gironde organise un concert, peut-être à Pessac, pour le Zamenhof-tago. Marcel en parlera à Christian et Elvezio se renseigne sur la disponibilité de la salle.

Fernando : Voir avec Le Bouscat.

Traduire des chansons en version « chantable » est difficile. On peut s'en rendre compte avec celles publiées sur le site des Kompanoj.

### 4. Questions diverses

- **Jean-Séb** demande pourquoi le projet Brassens n'apparaît pas sur le site des Kompanoj.

**Yannick** : Plus rien n'a été ajouté après le congrès de Lille. Nous pourrions l'utiliser dès la parution du livre. De même nous pourrions faire connaître le livre auprès des sites et groupes Facebook d'amateurs de Brassens et du site auprèsde-sonarbre.com.



- **Samson**, président de l'association

de coopération culturelle et économique Eurafrique.ACP.UE présente son projet de coopération et de développement par l'espéranto avec le lycée Béhanzin au Bénin. L'espéranto a déjà sa place dans ce pays grâce au travail de Mireille Grosjean.

On peut participer en adhérant à l'association, se réunir pour réfléchir ensemble. L'association propose des conférences, des envois de livres, la création de structures sur place et un projet éducatif avec le lycée Béhanzin. L'espéranto peut favoriser les rencontres, les échanges culturels, économiques, scientifiques...

- **Eric** : Vérification des destinataires de l'infolettre. La page Facebook a été réactivée : trois posts par semaine sur différents thèmes.

**Elvezio** : Clément revient dans la région. Il sera présent la dernière semaine universitaire pour présenter son expérience. Après le cours à 19h, le 17 avril, on peut se rencontrer, pour ceux qui pourront venir.

**Eric** : Le Petit Grain : quatre-cinq personnes sont venues la dernière fois, dont trois connaissent déjà l'espéranto ; il faudrait organiser des activités.

**Elvezio** : Le forum des associations de Pessac aura lieu le 7 septembre. Inscription avant le 21 avril.

Comment organiser le 1<sup>er</sup> mai ?

**Joël** : Commander des dépliants à Espéranto France pour les distribuer.

## **5. Renouveau du tiers sortant**

Le conseil d'administration démissionne dans sa totalité (Jean-Sébastien Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin).

Se présentent : Jean-Sébastien Brilleaud, Luca Buselli, Elvezio Canonica, Yannick Dumoulin, Janine Dumoulin, Eric Tiffon.

Les six candidats sont élus à l'unanimité.

Composition du conseil d'administration :

Jean-Sébastien Brilleaud, Luca Buselli, Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Eric Tiffon

L'assemblée générale ordinaire est clôturée à 13h.

## **Réunion du bureau à 13h15**

Election du bureau

Sont élus :

**Président** : Elvezio Canonica

**Trésorier** : Yannick Dumoulin

**Secrétaire** : Janine Dumoulin

Fait à Pessac, le 07 avril 2024, Elvezio Canonica, Président

## Printempaj festoj en Ukrainio

*Bildaro prezentita de Katya*

**L**a semajno antaŭ la Granda fasto nomiĝas fromaĝa semajno, Kolodiy, Masnytsia (grasa semajno), virina semajno. Ĝi estas antikva festo, kiu markas la renkontiĝon de vintro kaj printempo, la komencon de nova ciklo de vivo, la komencon de la nova jaro. Viando ne plu estas manĝata dum ĉi tiu periodo, sed multaj laktaĵoj estas manĝataj.

La ĉefa plado estas varenyki kun fromaĝo. La kutimo kuiri varenyki kaj festi la Kolodiy ferion ekzistis eĉ en la tempoj de trypillia kulturo (Neolitiko). (5,5 ĝis 2,5 mil a.K.).



Kolodiy estas la antikva ukraina dio de geedziĝo, repaciĝo kaj harmonio. Aldone, Kolodka estas ligna bastono. Ĝi simbolas la viran principon.

Varenyki simbolas la novlunon, kiu siavice estis simbolo de ina energio.

La Kolodiy-festivalo estas festita, ĝaje kaj ĝoje. Okazas grandaj foiroj kun muziko, kanto kaj plej diversaj distraĵoj.

Krome, ĉi tiu semajno estis nomita virina semajno, virinoj amuziĝis, kaj viroj devis obei

virinojn kaj elteni ilian "diboĉon". Dum ĉi tiu periodo, oni ne povis fari pezajn mas-trumojn, kudradon kaj brodadon.

Ĉiu tago havas siajn proprajn "moknomojn". Lunde Kolodka estis "naskita", marde ŝi estis "baptita", merkrede ŝi estis "edziniĝinta", ĵaŭde ŝi "mortis", vendrede ŝi estis "entombigita" kaj sabate ŝi estis "priplorita". Dimanĉe - "ni tiris la bastonon".

Ekzistis kutimo, ke virinoj ligas malgrandan bastonon al la mano aŭ gambo de fraŭlaj knaboj por puni ilin pro ne edziĝo dum la antaŭa jaro. Ĝia retiro estas rajtigita nur post elkompenso (dancoj, kantoj, dolĉaĵoj, trinkaĵoj aŭ mono). Estas malpermesite mem demeti ĝin. En tre humura maniero, la junuloj estas memorigitaj pri la graveco fondi sian propran familion. La juna knabino, siavice, povas en tiu momento esprimi sian simpatian al certa junulo al-kroĉante alian simbolan bastonon al la maldekstra mano de tiu ĉi junulo. Tia puno trafas la knabinojn, kiuj rifuzis geedziĝproponon en la pasinta jaro.



La tradicia fino de la festotagoj estas la forbruligo de grandega figuro de vintro, kiu simbolas la finon de la malvarmo kaj la naskiĝon de printempo kaj nova vivo.

Poste homoj petas pardonon unu de la alia pro la insultoj faritaj senintence aŭ intence. Homoj diras: "Pardonu min!" Responde, ni respondas: "Mi pardonas kaj Dio pardonos." Tial ĉi tiu festotago nomiĝas Dimanĉo de Pardono. La ukrainoj prepariĝas por la plej longa kaj strikta fasto el ĉiuj kaj tial ili diras: "Masnytsia, Masnytsia, kiel mallonga vi estas! – (pli bone estus,) se vi daŭrus sep semajnojn, kaj Granda Karesmo estus nur unu semajno!"



Salikodimanĉo (Palmodimanĉo) estas la dimanĉo antaŭ Pasko. Nermalhavebla eco de la festo estas salikbranĉoj, kiuj unue estas konsekritaj en la preĝejo, kaj poste uzataj por ŝerce "bati" parencojn kaj amikojn, kiuj restis hejme kaj ne iris al la diservo. Ili diras: "Ne mi batas - batas la saliko, Pasko estas en semajno, kaj estas ruĝa ovo ne malproksime!". Ni deziras unu al la alia sanon kaj prosperon: "Estu alta kiel saliko, kaj sana kiel akvo, kaj riĉa kiel la tero!". La saliko estas la unua planto, kiu komencas flori printempe kaj tial ĝi simbolas la vekigiĝon de la naturo.



Kredantoj kredas, ke la konsekrita saliko helpas protekti la domon kontraŭ akvo kaj fajro kaj donas al loĝantoj bonan sanon. La branĉoj estas do nepre konservitaj ĝis la venonta Palmodimanĉo.

La simboloj de la Paska festo estas paska pano, krashanka (kolora ovo) kaj Pysanka (ornamita ovo).

Paskaj ovoj kaj pano estas preparitaj ĵaŭde (Sankta ĵaŭdo) aŭ la sabaton antaŭ Pasko. Vendrede (Sankta Vendredo), estas malpermesite fari paskan panon kaj kolorigi ovojn.



Pysanka estas ovo ornamita per tradiciaj simboloj pentritaj per vakso kaj tinkturfarboj. Manfarita ĝi estas fidinda amuleto por la familio kaj la hejmo. Knabinoj donas la ornamitan ovon al siaj koramikoj, foje inverse; en kelkaj lokoj ili estas donataj al karaj gastoj.

En la urbo Kolomyia estas la Pysanka Muzeo.



Matene de ĉi tiu tago, ni prenas la paskan korbon kaj iras al preĝejo, havas kolorajn ruĝajn ovojn (Krashanka), paskan panon, akvon, viandan kolbasojn, vinon benitajn. Post beno ni matenmanĝas ĉi tiujn pladojn.

Konsekritaj paskaj ovoj (Krashanka) kaj paska pano estas la unuaj pladoj, kiuj rompas la faston.

Tiun matenon, la knabinoj metas konsekritan Krashanka ovon en la akvon, poste ili lavas siajn vizaĝojn per tiu ĉi akvo por aspekti belaj.





Antaŭ ol manĝi, infanoj kaj plenkreskuloj ludas tradician paskan ludon - Navbytki (aŭ batado de ovoj). Ludantoj ŝoktrafas ovojn.



La regulo de la ludo konsistas el du ludantoj tenantaj po unu ovon en sia mano kaj batas ilin unu kontraŭ la alian sen rompi la sian. Unue, ni frapas "nazon al nazo" (ovopinto), kaj post rompo, ni frapas per "granda fino" (ovopugo).

Venkas tiu, kies ovo montriĝis pli forta. Ruĝaj ovoĵ donas sanon, belecon, forton.

Laŭ legendo, la sankta mirportistino Maria Magdalena iris al la imperiestro Tiberio, por sciigi al li la novaĵon pri la resurekto de Jesuo. Ŝi devis aperi antaŭ la imperiestro kun donacoj. Maria estis malriĉa virino, do ŝi alportis nur ovon kiel simbolon de eterna vivo kaj renaskiĝo, ĉar ĝi havas nek komencon, nek finon.

Kiam ŝi diris al Tiberio, ke Jesuo releviĝis, la imperiestro ne kredis ŝin. Li diris, ke tio estas neebla, same kiel estis neeble, ke la ŝelo de ovo fariĝu de blanka al ruĝa. Tuj antaŭ la okuloj de la surprizita imperiestro, la ŝelo ruĝiĝis. "Li vere reviviĝis!" kriis Tiberio. Nun ĉi tiu frazo estas deviga saluto en Paska Tago. Kaj ankaŭ estas formulo por saluti ĝis la Ĉieliro: "Kristo releviĝis!" kaj respondu: "Vere, li releviĝis!" La sekva dimanĉo kaj la lundo post Pasko estas memortagoj (Ĉiuj Sanktuloj) aŭ adiaŭoj. (Antaŭ tio, homoj iras al la tombejo, purigas la tombojn, plantas florojn).



En la tago de memorfesto homoj iras al la tombejo kun siaj familioj, invitas ĉiujn parencojn por rememori siajn forpasintajn parencojn kune en ĉi tiuj tagoj. Al la tombejo estas invititaj pastroj, kiuj konsekras la tombojn kaj servas mallongajn preĝojn. Homoj kunportas florojn, paskajn ovojn, kaj aliajn aferojn, por manĝi proksime de la tombo, kaj memori siajn mortintojn dum la manĝo per afablaj vortoj, memorante epizodojn el la vivo de la mortinto. Estas ankaŭ kutimo lasi paskajn ovojn sur la tomboj, por ke la mortinto povu kundividi la feston kun ĉiuj. Kiel regulo, ĉi tiuj paskaj ovoĵ, kune kun bombonoj, paskaj kukoj kaj aliaj bakajoj, povas esti prenitaj fare de infanoj post preĝo en ceremonio. Krome, bombonoj estas disdonataj al aliaj, antaŭ ol foriri. La homoj, kiuj ricevas diras "Regno de la ĉielo", tiel memorante la animon de la mortinto.

# ESPERANTO-GIRONDE

## KUNVENO en Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC

### la 9an de junio 2024

### de la 10a 30 ĝis la 16a30

**Ĉ**eestas: Ĵanseb kaj Annie Brilleaud, Elvezio Canonica, Karima Choukairi, Janine kaj Yannick Dumoulin, Pascal Engelibert, Hervé Giranton, Katya Gradzian, Lucienne Laroche, Dominiko Martins, Olivier Moreno, Klodin' Pomiro, Marcelo Redoulez, Eric Tiffon, Fernando Torres.

Senkulpigitaj: Gloria Gargallo, ge-Sarlandie

**Elvezio** bonvenigas al ĉiuj, kaj specife al Pascal, el la grupo de la Grajneto. Pascal programas liberajn programerojn, lia fako estas informadika sekureco.

La venonta kunveno en la Grajneto okazos la 27an de junio.

La 1an de majo ĉirkaŭ 10 homoj venis sub la banderolo de Esperanto-Gironde.

**Marcelo kaj Klodin'**: raportas pri Strasburgo, kie okazis la Eŭropa kongreso de la 8a ĝis la 11a de majo. Ĝi estis lokita en la Universitato, tre agrabla loko, kie estis disponeblaj 4 amfiteatroj kaj malgrandaj salonoj. Partoprenis preskaŭ 600 homoj. Ĉeestis ankaŭ Bernardo kaj Rose.

Estis tre interesa ekspozicio pri libro de profesoro el belga universitato. La libro temas pri strategio de politikistoj por propagandi kaj akceptigi la politikon pri milito. Ankaŭ okazis prelego de tiu profesoro. En la programo estis universitat-nivelaj prelegoj (ekz. Amri Wandel). Mirej' Grosjean prezentis pluraj aferojn.

Ĉiuvespere estis artaj aranĝoj: koncertoj programitaj de Flo kaj aliaj; estis itala, germana artistoj. Partoprenis ankaŭ Guillaume Armide, kun engaĝitaj tekstoj, kiuj estis projekciitaj. Li reprenis la torĉon de Ĵak La Puil.

Estis ankaŭ la okazo revidi amikojn.

**Elvezio:** La lasta kurso okazis ĉe Jean-Seb. Venis niaj nunaj studentoj. Artikolo por LEGI kun fotoj estas preparata. Nova prezidanto de la universitato estis elektita; eble ne povos esti kursoj de Esperanto venontjare. Ni Ricevis 500 broŝurojn de Esperanto France kaj disdonis kelkajn okaze de la 1a de majo, kaj disdonos ankaŭ dum la forumo de la asocioj la 7an de septembro.

Esperanto-Gironde aliĝis al la pesaka urba retejo.



**Klodin'**: Pri la GEME grupo: ili daŭre lernas kun Marcelo, Gloria kaj Klodin'.

**Elvezio**: Pri EDE baloto: li gluis 20 – 25 afiŝojn en la ĉirkaŭaĵo kun Luca kaj Jean-Seb. Bernard same faris en Le Haillan. Elvezio sendos foton kaj raporton por LEGI.

**Marcelo**: Pri la oficiala filmeto de la balotkampanjo: Jacques Ravary informis, ke lia nepino kaj ŝia kunulo estis invititaj de Bert Schumann por aktori en iu filmeto, sed ne estis informitaj, ke temas pri la baloto. Tio ŝokis ilin.



**Eric**: Dominiko forigis malnovajn aferojn el la retejo, kaj aldonis novajn.

**Dominiko**: Kreis lokon sur la retejo, por ke Elvezio povu afiŝi.

**Marcelo**: Pri Brassens: Estas problemo pri la tiparo; ne plu eblas sur la nova komputilo trovi la tipojn de IPA (internacia fonetika alfabeto). Cetere havas multajn aferojn por fari, kaj nun ne povas zorgi pri tiu problemo. Diskutos kun Pascal por trovi solvon.

**Yannick**: Ni ricevis antaŭtakson de la presisto de Montendre. Por 1000 ekzempleroj: 8292€. Ni petis refari la taksadon por 100. La libroj estus ne kudritaj sed gluitaj.

**Marcelo**: Ili povas esti tiel malpli fidindaj, se ofte malfermitaj kaj fermitaj.

**Yannick**: Pri la rajtoj: Ĉio estas pagita, escepte de unu titolo, pri kiu oni ne havas la rajton (Heureux qui comme Ulysse). Nura problemeto: La eldonejo Flammarion skribis en la kontrakto, ke la libro estu publikigita en aprilo.

**Marcelo**: Ĉeestis la inaŭguron de la placo Lucien Peraire la 8an de junio. Sendos fotojn kaj artikolon.

**Dominiko**: Ĉu povas esti vendataj la pingletoj el la ŝranko ?  
Aprobo.

**Marcelo**: Novaĵoj pri Christian Leduc. Li turneas en Bretonio. Li ŝatus ricevi materialon por informi pri Esperanto en siaj koncertoj. Li volonte venos en decembro sed ne la 15an. Li povus esti disponebla la 8an. Ĉu la koncerto okazus ĉi tie por nur ni, aŭ ĉu temus pri pli larĝa evento? Do eble peti de liberecanaj asocioj por la organizo?

Fino de la kunveno je la 12a 30.

**La venontaj kunvenoj okazos la 15an de septembro kaj la 13an de oktobro.**

*Raportis Janine*

Lucien Péraire, antaŭ unu jarcento

## Bicikle tra la mondo



Sabaton la 8an de junio la lotgaronia urbeto Lavardac inaŭguris monumenton honore al Lucien Péraire, kiu tie naskiĝis en 1906. La urbestro, Ludovic Biasotto, omaĝe rakontis lian heroaĵon. Li salutis tiun esperantiston, kiu inter 1928 kaj 1932 biciklis de Atlantiko ĝis Pacifiko. Cento da ĉeestantoj admiris la kreaĵon de la skulptisto Stéphane Munoz, kiu volonte komentis la 8,40m altan statuon. Kvardeko da geesperantistoj el Esperanto-Gironde, Perigorda Grupo, EKC de Tuluzo, Arieĝo, kaj la Bicikla E-Movado Internacia (BEMI) renkontis la multnombrajn familiojn kaj kelkajn vilaĝanojn.



*La genia eltrovaĵo de Lucien por bicikli tra Siberio sur fervojo*



*Klodin' Monique Katja*

La monumento estas starigita borde de la eksa trajlinio de Fauguerolles al Condom, estonta bicikla verda vojo. La ceremonio estis emociiga, des pli ke aŭdiĝis registrita voĉo de Lucien Péraire mem. Post la urbestro kaj la skulptisto parolis la prezidanto de BEMI Melanie Leyla Brücker (Linko) en Esperanto, kaj niaj geamikoj Martine Demouy kaj Claude Labetaa, kiu legis ekstrakton el la broŝuro *Bicikle tra la mondo* eldonita de Kribo jam en 1974.



*La verda vojo - funde eksa stacidomo*



*La oficiala inaŭguro*

*Pliajn informojn en la franca vi legu ĉe:*

<https://weelz.ouest-france.fr/lucien-peraire-le-bikepacker-esperantiste-qui-mit-le-velo-sur-les-rails-du-transsiberien/>

<https://www.lotetgaronne.fr/actualites/inauguration-dune-sculpture-et-voie-verte-a-la-memoire-de-lucien-peraire-a-lavardac>

*La broŝuron «Bicikle tra la mondo» vi libere elŝutu ĉe:*

<https://bitoteko.esperanto.es/xmlui/discover?scope=%2F&query=Peraire&submit=>

*Raportis Marcelo*

## Lucien PERAIRE

### Humanista mondvoĝulo

**E**n tiu varma tago, la 8an de junio 2024, mi malfrue alvenis en Lavardac, komunumo de la departemento Lot-Garonio, por ĉeesti ceremonion omaĝe al Lucien Péraire. Tuj mia rigardo estis kaptita de grandega 8,40 metrojn alta statuo montranta biciklanton sur lia relbiciklo starantan sur terglobo. Tiun verkon elpensis Stéphane Munoz, fama akvitanian kartonisto.

Jam memoriga plato estis surmetita sur la fasado de la naskiĝdomo de Lucien Péraire, en la sama vilaĝo, la 26an de marto 2022.

Ĉeestis la urbestro, Ludovic Biasotto, kelkaj vilaĝanoj, la multnombraj familioj de Lucien, kelkaj Esperantistoj el Tuluzo, Arieĝo, Dordonjo, Ĝirondio, Germanio, ankaŭ anoj de la asocio internacia de esperantoparolantaj biciklistoj.

La statuo troviĝas sur placo, apud kiu baldaŭ “verda vojo” baptota Lucien Péraire naskiĝos.

Lucien Péraire naskiĝis en Lavardac la 26an de julio 1906 en modesta familio entenanta 9 infanojn. Li ne longe frekventis la lernejon, kaj rapide manlaboris. En 1927 li eklernis Esperanton kaj tuj projektis vojaĝi tra la mondo, de julio 1928 ĝis julio 1932, unue kun germana Esperanta biciklanto, Paul Posern, sekve al anonco aperinta en la revuo de SAT, poste sola, cele al elkovro de la mondo kaj ties popoloj. Li tiel iris tra Francio, Germanio, Ĉeĥoslovakio, Aŭstrio, Pollando, kaj Rusio, en kiu manko de vojoj instigis lin inventi “relbiciklon” por ruli sur la “Transsiberiaj” fervojoj. Li finis sian periplon tra Manĉurio, Japanio, Ĉinio, Indonĉinio. En ĉiuj landoj li laboris, partoprenis en la laboro de la loĝantoj, en ilia ĉiutaga vivo, iliaj spertoj, kaj konatigis Esperanton per kursoj, prelegoj...

Li mortis la 19an de novembro 1990 en Lehon (Côtes d'Armor).

Li kuŝigis siajn multnombrajn aventurojn sur multajn kajerojn, per stenografia skribaĵo. Dum jaroj li suferis multajn rifuzojn flanke de francaj eldonistoj. Ekzistas libreto nomata: *Tra la mondo per biciklo kaj Esperanto* skribita en 1974, eldonita de la Juna Penso. En 1990, la Esperanta klubo de Aĝeno eldonis alian pli kompletan. Tiuj altvaloraj notoj liveras informojn pri la situacioj politika, socia, kultura de la tiuepoke trairetaj landoj.



Ni piknikis, Marcelo, Claudine, Katya kaj mi, apud la rivero Baïse en la bela bastido Vianne, kiun ni piede vizitis posttagmeze.

*Monique*

## EEK 2024

Ĉar la UK en Aruŝo estas tro kosta por ni, ni decidis partopreni en la Eŭropa Esperanto Kongreso en Strasburgo. Ni vojaĝis trajne, rekte de Bordoza al la dua ĉefurbo de la Eŭropa Unio kaj loĝis en tre agrabla, komforta kaj taŭge situata hotelo «Cerise».

Ni, kaj la tuta kongresanaro, estis tre feliĉaj, ĉar ni ĝuis belegan veteron, kiu daŭris nur unu semajnon!

Ni vizitis posttagmeze kaj sekvant-matene la urbon kaj la Eŭropan parlamenton: ege interese; se vi vizitos Strasburgon, estas nepra vizito!

La solena malfermo okazis merkredon la 8an de majo je la 14a. Surpodie sidis reprezentantoj de Esperanto France, de la Germana, Belgaj, Itala asocioj, kaj Rodica, nia amikino, prezidantino de IFEF. Ŝi proponis fari retan prelegon al nia grupo, se ni dezirus.

Kiel kutime dum kongresoj, ni ŝatas partopreni en ekskursoj: do ni vizitis la katedralon kun esperantista gvidanto, kaj alian tagon ni boate ĉirkaŭiris la urbon kun triono de la kongresanaro. Ankaŭ ege informa vizito, same kiel en la trajneto.

Ĉiun vesperon okazis koncertoj, kaj ni malkovris ses kantistojn, kiujn ni ne konis antaŭe.



Ni ankaŭ partoprenis en kelkaj prelegoj, eĉ en unu kies titolo estis: «Babilado inter komplotoj», kie ni aŭdis multajn stultaĵojn.

Dum la solena fermo, estis memorigite al ni, ke antaŭ 50 jaroj okazis sama kongreso en la sama loko. Kelkaj kongresanoj partoprenis en ambaŭ!

Ĉar mi eraris, ni devis ŝanĝi la trajnon, kaj ni revenis tra Parizo. La vojaĝo de Straburgo al Parizo daŭris la saman tempon, kiel de Bordoza al Strasburgo!

Kaj dum la fermo de la kongreso, ni renkontis geamikojn (ne Esperantistajn), kiujn ni ne vidis de 34 jaroj! Belega renkonto: ŝajnis ke ni disiĝis nur du tagojn antaŭe.

*Bernardo kaj Rose*





**D**um la SAT-kongreso 2023 en Greziljono Sandor Horvath, el Adelajdo, invitis Marcelon prelegi kadre de la monata perreta kunveno de la Aŭstralia Esperanto-Asocio. Tiu rendezuo regule okazas ĉiumonate la trian dimanĉon. En aprilo, do la 21an. Je la 17a en Sidnejo, do je la 9a en Bordoza (pli bone, ĉar ĝis du horojn pli malfrue dum somertempo!).

Inter la proponitaj temoj, Sandor elektis «Brasenso en Esperanto».

Tiun temon Marcelo ja bone majstras, ĉar li jam prezentis ĝin diversloke kaj antaŭ diversaj publikoj. Tamen por li jen nova defio: perreta prelego! Tio signifas, sen fronta reago de la aŭskultantoj, kaj ĉefe malkomforto pro malregado de la tekniko! Dankon al Claude Labetaa, la Perigoza najbaro, pro lia pacienca instruado la antaŭan tagon.

Kiel kutime la ebleco trovi geamikojn el la tuta mondo kaj libere diskuti estas granda plezuro. Kvaronhoron antaŭ la rendezua horo jam kelkaj aperas sur la ekrano. Serĝo jam frumatene petolas kaj provas malstreĉigi Marcelon. El Svedio, Bettan memoras pri nia Lilla spektaklo. Kaj jen alvenas Sandor, la organizanto kaj iom post iom la ekrano pleniĝas je fenestretoj. Kelkaj vizaĝoj, kelkaj nigraj kun nomo aŭ pseŭdonomo. Finfine, kiom da ĉeestas ne eblas vere scii. Pluraj estas nekonatoj el Aŭstralio, Japanio, Armenio, Pollando, Belgio ekzemple; tamen ankaŭ konataj subtenantoj bonvenas. Kaj ne nur el Esperanto-Gironde bone reprezentata: Elvezio, Janine kaj Yannick, Eric, Dominiko; jen Haesim kaj Ermito, ambaŭ el Koreio, Yoshie kaj Dieter el Germanio, Rodica el Rumanio, Liba el Parizo, ktp.

La prezento daŭru unu horon. Marcelo havas tiom multe por montri kaj rakonti. Jam dekomence la tempo ŝajnas tro mallonga. Viva estas la afero: ĉeestantoj ne hezitas respondi kelkajn demandojn de Marcelo. Ekzemple «Kiujn lingvojn vi rekonas sur tiu bildo?»






Kaj demandoj venos ankaŭ al Marcelo. Krome la aŭskultado de la kanzonoj de Brasenso registritaj de diversaj artistoj variigas la tonon. Tio plaĉas al la ĉeestantoj, eĉ al tiuj, kiuj neniam antaŭe aŭdis lin aŭ pri li. La ĉeesto de Serge estis okazo muzikigi Brasenson ĵazece dank' al registraĵo de «La temp' ĉiteme plej malgravas» far la trumpetisto Cat Anderson. Laŭ la malkovro de la bildoj la retumantoj estas invititaj kunkanti kun Olivier Tzaut, Ĵak Le Puil kaj kompreneble Jacques Yvart.

Tempo jam fluis. De temo al rubriko, de unu al alia gravulo en la afero, baldaŭ venis la tempo libera por la demandoj.

Kvankam Marcelo forgesis prezenti la ĝeneralajn tempojn de la verkaro de Oĉjo Georgo, neniu demando ĉi-rilate venis. Kvankam li antaŭplanis montri la foton de Janine kaj raporti pri ŝia ĉefrolo, li forgesis.



Sed multaj montris intereson per persona kontribuo en la diskuto. Kaj fine ĉiuj dankas kaj gratulas Marcelon pro la kvalito de la prezento.

Kiel ofte post spektaklo, li en kapo nur bedaŭras ĉiujn mankojn de la pasinta horo. Li kiel kutime bezonos iom da tempo, antaŭ ol plene kunĝui la ĝeneralan entuziasmon.

Fakte sekvas kelkaj kortuŝaj retmesaĝoj, inter kiuj unu de Betti Maul titolita «Voĉo el pasinteco»: «Estas amuze post jardekoj legi vian nomon en retmesaĝo el Aŭstralio».

Jen alia: «Dankon! Saluton el Joseph Nlandu. Mi varme deziris sekvi vin sed pro dormemo, mi ne eltenis. Mi estas Afrikanano El Kongo Kinshasa kaj nuntempe loĝas en Usono de 2015.

Tre plaĉis al mi parolante pri muziko. Kaj estis mia unua fojo aŭdi pri tiu fama muzikisto. Mi tre kuraĝigas vin pro via prezentado».

\*\*\*

La prezentado restas spektebla ĉe: <https://youtu.be/NJecOixTnBY>

## De la 8a ĝis la 12a de majo 2024 Eŭropa Esperanto Kongreso okazis en Strasburgo.

**K**rom Esperanto-France troviĝis ankaŭ la Germana Esperanto-Asocio (GEA), la Belga Esperanto-Federacio (BEF), la Svisa Esperanto-Asocio (SES), la Itala Esperanto-Federacio (IEF), la Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio (IFEFF), kaj la Internacia Ligo de Esperantistaj instruistoj (ILEI). Subtenis tiun eventon UEA (Universala Esperanto Asocio), EEU (Eŭropa Esperanto-Unio), kaj Esperanto-Jeunes.



La tagprogramo okazis en konstruaĵo de la Universitato nomata *Patio*, kiun studentoj liberigis dum tiu longa maja semajnfino, kaj ni spektis la vesperajn programojn en alia loko, urba salono «*Salle du manège*» iom pli for. La du lokoj estis facile atingeblaj per tramo aŭ buso.

La temo de la kongreso: «Dialogo inter eŭropaj popoloj» bone akordiĝas kun la urbo Strasburgo (kaj reciproke), kiu tre bone taŭgas tiucele pro sia eŭropeca etoso.

Paralele al la kongreso okazis en la urbo «Eŭropa semajno de Esperanto», oportuna

montrofenestro por videbligi Esperanton ekster la Esperanto movado. Tiucele diversaj aranĝoj ebligis al interesata ekstera publiko aŭdi pri Esperanto kaj malkovri la lingvon kaj ĝian kulturon. Ankaŭ la vesperaj programoj estis malfermitaj al ĉiuj.

Pli ol 550 aliĝintoj renkontiĝis, intersanĝis, diskutis, kunvivis tagojn plenajn je interesaj prelegoj, riĉa programo, promenadoj, ekskursoj. Ankaŭ la tre bela vetero dum la semajno kontribuis al la sukceso de tiu evento. Certe ĉiu el ni kontente rehejmiĝis kun sunaj kaj interesaj memoroj kaj ni povas danki la organizantojn pro ilia engaĝiĝo kaj klopodoj en organizado de tiu kongreso.

Preter ĉiuj nesuspektitaj kaj neeviteblaj malfacilaĵoj, kiujn ili devis solvi, ni memoru la sukceson de tiu evento. Ni deziras al ili sekve merititan ripozon.

*Klodin'*

Vi povas vidi fotojn en la komuna albumo alirebla tie: <https://photos.app.goo.gl/3RTjL5uXo4m8Hbj88>

# Eŭropa Esperanto Kongreso

## Ekspozicio kaj prelego:

### *Rezisti la militan propagandon.*

### Kiel konvinki la publikan opinion subteni militon?


Ĝus alveninte ĉe la supro de la ŝtuparo en la granda halo, kie troviĝas la akceptejoj, eduka ekspozicio allogas: "*Rezisti la militan propagandon*".

Ĉu ekzistas iu maniero igi nin aprobi militon? La dek principoj de militpropagando, ĉi tie disvolvigitaj, montras al ni, ke eblas konvinki la publikan opinion subteni militon, kaj la sama metodo estas aplikata, regule kaj efike, de propagandagentejoj ĉiuflanke.

Tiu ekspozicio, origine en la franca kaj nederlanda, elmontras la metodojn, rimedojn kaj argumentojn de milita propagando dum la konfliktoj de 1914 ĝis la nuna tempo.

Propagando ne estas la sola laboro de diktatorejoj. Tiel nomataj demokratiaj reĝimoj ankaŭ praktikas ĝin sub la titolo: "informo" aŭ "komunikado".

Tiuj dek principoj de milita propagando estis unue listigitaj de la brita diplomato lord Ponsonby en 1914.



Anne Morelli estas historiistino, profesoro ĉe Universitato de Bruselo kaj specialisto pri historia kritiko. Ŝi prelegas pri tiuj 10 principoj, kiuj aperas en ŝia libro «*Elementaj principoj de milita propagando*». La prelego estas en la franca kaj samtempe tradukita en Esperanton. Ŝia laboro komence celis atingi la studentojn. Anne Morelli priskribas la esencajn mekanismojn de moderna propagando uzitajn kaj dum la Unua Mond-Milito kaj dum pli lastatempaj konfliktoj. La dek principoj prezentitaj de la aŭtoro ne celas subteni flankon, aŭ defendi iun ajn, sed noti la regulecon de tiuj principoj de propagandoj, unuanime uzataj en la amaskomunikilaro. Tiu tre eduka analizo estis poste tradukita en la nederlandan, italan, hispanan, germanan, japanan kaj Esperanton. La unua eldono de la libro estis plurfoje reeldonita kaj ĝisdatigita. Ĝi fariĝis klasikaĵo por malkondi la propagandon, kiu inundas nin kun ĉiu milito por igi nin akcepti ĝin. Tiu libro vere meritis esti konata de kiel eble plej multaj homoj. Ĝi troviĝas en la libroservo de Esperanto-France.

*Klodin'*

## Eŭropa Esperanto Kongreso

### Monique Arnaud prezentas al ni ĉe libroservo: En la hejmurbo de La Fontaine, fabloj kiel subteno por originala multkultura sperto.



Jean de La Fontaine naskiĝis en 1621 en la urbo Château-Thierry. Okaze de la 400-a datreveno de lia naskiĝo, konkurso estis organizita de la urbo por honori lin. Alvoko por projektoj estis lanĉita. Greta Franclet respondis al tiu ĉi alvoko. En tiu urbo de 15000 loĝantoj, 29 malsamaj lingvoj estis parolataj. Greta Franclet, kiu pledas por lingva diverseco kaj promocio de gepatraj lingvoj, jam kreis la asocion «*Les langues Autrement*» («*Lingvoj alimaniere*»). Ŝi ankaŭ deziris malkovrigi la lingvistikan riĉecon de la enloĝantoj.

La fabloj de La Fontaine estas popularaj kaj kelkaj estas ofte konataj en multaj landoj. Jen kiel naskiĝis ŝia ideo prezenti kiel projekton por la konkurso: «*Rakontu al mi La Fontaine en via lingvo*» per kreado de mallonga filmo ĉirkaŭ tri fabloj: *La Lupo kaj la Ŝafido*, *La Cikado kaj la Formiko*, *La Korvo kaj la Vulpo*, luditaj kaj rakontitaj de lokanoj, plenkreskuloj kaj infanoj parolantaj en sia gepatra lingvo.

Kaj ŝia propono estis elektita.

Spekteblas ĉe: [Youtube.com/watch?v=6SyUo0c9eqQ](https://www.youtube.com/watch?v=6SyUo0c9eqQ)

Greta Franclet kaj Monique Arnaud sin konis antaŭe. Ili renkontis sin en Parizo dum foiro Expolangues, kie Monique deĵoris ĉe Esperanta budo kaj Greta prelegis pri sia libro *Nul en langues, plus jamais* («*Mallertega pri lingvoj, neniam plu*»), libro, en kiu ŝi aludis pri Esperanto. Tiu libro estas nuntempe elĉerpita sed dua titolo, kiu nomiĝas *Les langues, un jeu d'enfant* («*Lingvoj, infanludo*») sekvas ĝin.



De tiu kunlaboro finfine rezultas originala prezentado, unika, vigla, de fabloj en la gepatraj lingvoj parolataj en la urbo... kaj en Esperanto! Jen la 30a lingvo! Rekompenca sukceso por ĉiuj kaj por pli bona kunvivado.

Sekve, Migrilude-eldonoj, specialiĝintaj pri propagando por gepatraj lingvoj, kunlabore kun la asocio *Les Langues Autrement* daŭrigas la projekton per eldono de du ilustritaj libroj sub du malsamaj titoloj.

*Le corbeau and the fox* por la lingvoj angla, germana, nederlanda, japana, ukraina.


*Le corbeau y el zorro* por la lingvoj franca, gvadelupa kreola, Esperanto, hispana, itala, rumana.

[https://www.migrilude.com/fr/blog/post136\\_corbeau-renard-miltlingues.html?page-type=post](https://www.migrilude.com/fr/blog/post136_corbeau-renard-miltlingues.html?page-type=post)

Aŭdversio haveblas por ĉiu lingvo. Por aŭskulti Esperanton, klaku sur *version langue romane*, poste malsupre de la paĝo sur *version audio Esperanto*.

Dum la Eŭropa Esperanto Kongreso en Strasburgo Monique faris sian prezenton en la libroservo, pli taŭga kaj intima loko ol granda amfiteatro. Kaj La Fontaine estis tie en bona kompanio. Kelkaj vizitantoj de la libroservo, ne informitaj pri la prezentado, scivoleme aŭskultis. Kelkaj volonte pruntedonis sian voĉon por vivigi la korvon aŭ la vulpon. Dankon Monique pro tiu donaco kunhavigi tiun lingvan sperton kun ni kaj dankon pro via engaĝiĝo kaj via helpo por produkti ĝin en Esperanto.


Klodin'



- Vous êtes le phénix des hôtes de ces bois. »  
À ces mots, le Corbeau ne se sent pas de joie,
- Yo dit mwen pas ni chantrelle  
qui tini lavoué pli belle passé ou, en vérité.  
Compè mwen t'en prie, souplé,  
moutré mwen yo pas menti.  
Ca ké fè mwen bien plaisi si tout ça yo dit mwen vrai. »
- Usted es el Fénix de los seres de este bosque lindo. »  
Al oír tan dulce discurso,  
el Cuervo rebosa de alegría y orgullo,
- Vi estas de l'arbaro la feniksa gasto. »  
Je tiuj vortoj ekĝojegas korvo vanta.
- Voi siete una Fenice. » A questo dir  
non sta più nella pelle, il Corvo vanitoso,
- Mă prind c-ați fi vreo Pasăre Măiastră!  
Și corbul, auzind-o, pe gânduri nu mai șade.

**Guide pratique**  
pour s'éveiller aux langues dès le plus jeune âge

**Les langues,**  
un jeu d'enfant !



Haveblas ĉe la libroservo dum la kongreso.

## Kelkaj fotoj pri la Eŭropa Esperanto Kongreso en Strasburgo, majo 2024



Kantateliero kun Kajto



Kun Katalin Kovats



## Rezisti la militan propagandon

Tu ekspozicio, en la Franca kaj la Nederlanda, elmontras la metodojn, rimedojn kaj argumentojn de milita propagando dum la konfliktoj de 1914-1918 ĝis la nuntempaj

10 principoj de milita propagando, unue listigitaj de la brita diplomato lord Ponsonby en 1914:

- 1 Ni ne deziras militon  
(Kompreneble, ni ĉiuj estas pacemaj homoj!)
- 2 Nur la alia flanko respondecas pri la milito  
(Defendante, la respondoj trovas manojn al ni.)
- 3 La malamikoj havas la vizaĝojn de la diablo  
(Tera monstro atakas nin, ni!)
- 4 Neniu kaŭzo ni defendas kaj ne propagas interesege  
(Ni defendas civilizacion, kulturon, barbon, hereditajn valorojn.)
- 5 La malamiko komencis provokojn, kaj ni faras malsuajn, sed la venko  
(Ĉiuj estas pacemaj homoj, kaj ni estas, ne povas fari krimajn, kompreneble, nur defendi nin defendante.)
- 6 La malamikoj uzas agnostecajn amonicojn  
(Ili estas mormonoj, eĥoj, kiam temas pri barbon, ili ne povas kaŭzintecce batali kun ni.)
- 7 Ni sukcesas malmulte da perdis, tiuj de la malamiko estas vigoj  
(Ili ne amikas la barbon.)
- 8 La amikoj kaj intelektuloj subtenas nian kaŭzon  
(AMIKOJ! Tio ĉi estas homoj subtenas civilizacion.)
- 9 Nia kaŭzo havas sanktan karakteron  
(Ni kompreneble, amas, defendante subtenas nin.)
- 10 Tiuj, kiuj esprimas dubojn pri la propagando estas perfiduloj  
(Ni, amikoj, ni, kiuj estas tiuj ekzempluloj kaj legas tiun libron.)

Principoj priskribitaj, Marĝinitaj kaj analizitaj de Anne Morelli en sia libro:  
**ELEMENAJ PRINCIPOJ DE MILITA PROPAGANDO**  
eldonita de **esperanto France**



Malfermo de la kongreso



## Neforgesebla promeno

*Fakte, la tekston eble vi komprenos nur post ripetado*

Lana tapiŝo.  
Stana pokalo.  
Stel' sur afiŝo.  
Ronda bokalo,  
En ĝi detalo:  
Mi, la orfiŝo!

*Mi esperas, ke la kantontoj de tiu kanono ne forgesos la unuan noton antaŭ ol kanti la lastan! Ĉar laŭ populara elpenso, memoro de orfiŝo daŭrus nur naŭ sekundojn, t.e. nur la tempo necesa por ĉirkaŭi ĝian bokalon.*

La orfiŝo rondnaĝas en sia bokalo. Unue plonĝante ĝi vidas lanan tapiŝon. Due surflanke ĝi vidas stanan pokalon, kiu staras apude sur la meblo. Daŭrigante sian naĝadon, ĝi ekvidas afiŝon sur la muro. Sur la afiŝo brilas stelo. Sed la nazo nun frapas la vitron de la bokalo. Kaj la fiŝo daŭrigas sian rondnaĝadon, ĉiam nove malkovrante la mondon ĉirkaŭ si.

Kaj se tiam la fiŝo ŝanĝas la naĝdirekton, la teksto kantas:

Stel' sur afiŝo.  
Stana pokalo.  
Lana tapiŝo.  
Ronda bokalo,  
En ĝi detalo:  
Mi, la orfiŝo!



*Marcelo, la 12an de majo 2024  
Dum la Eŭropa Kongreso en Strasburgo*



## SOLVOJ DE LA LUDOJ DE LA NUMERO 174

### Unua erarludo:

*Baldaŭ Iberla ne plu bezonos aŭtomatan traduk-helpilon, kiu foje ankaŭ bezonus sekvi kursojn, por eviti gramatikajn erarojn! Trovu ilin!*

*Marcelo*

Miaj karaj Klodin' kaj Marcelo,

Ni ĝojas pri nia renkontiĝo ĉi-matene kaj ni **antaŭĝojas la venontan!** Persone mi tre aprezis viajn komentojn kaj klarigojn, **ĝi** multe pli **facilas** kaj **rapidigas** la komprenon.

Vi povas imagi, ke mi havas helpon de **rettradukisto**, sed indas provi komuniki en Esperanto.

Dankon ankaŭ pro la libro, kiun Claudine pruntedonis al Thibauld. Ĝi rememorigis min pri alia... montriĝas, ke **ĝi estas** la sama aŭtoro!

Mi ŝatus veni morgaŭ, sed kun la infanaj agadoj **ne estas donita**. Ve! Estas domaĝe maltrafi ĉi tiun ŝancon.

Dezirante al vi agrablan semajnfinojn, saluton al la tuta Pessac-teamo, kaj grandajn kisojn al vi ambaŭ.

**antaŭĝojas la venontan** -> **antaŭĝojas pri la venonta**

**ĝi** multe pli **facilas** kaj **rapidigas** la komprenon -> **tio** multe pli **faciligas** kaj **rapidigas**

**rettradukisto** -> **rettradukilo**


**ĝi estas** -> **temas pri**

**ne estas donita** -> **tio ne estas facila** aŭ **tio ne estas garantiita**

### Dua eraludo:

*Krei bildojn dank' al Arta Inteligenteco. Marcelo*

Romantiques, deux jeunes, une fille et un garçon, randonnent sur la montagne. Ils portent des sacs à dos sur lesquels on peut voir une étoile verte à cinq branches. Ils parlent espéranto.»



Nur la bildo 3 pli malpli respondas al la postuloj (eĉ se la verda stelo kuŝas sur la tapiŝo kaj ne precize sur la tornistro mem).

Sur la bildo 1 oni ne vidas la verdan kvinpintan stelon sur la tornistroj de la gejunuloj.

Sur la bildo 2 la stelo havas nur kvar pintojn.

Sur la bildo 4 oni ne vidas la stelojn sur la tornistroj.

*Janine*

**Kroniko de Volito dum la elsendo Radio Esperanto  
ĉe Radio Libertaire  
Vendredon la 14an de junio 2024**



**Kolerkrio sekve al la rezulto de la Eŭropaj balotoj la 7an de junio 2024  
kaj al la **dissolvo** de la franca Nacia Asembleo far la prezidento**

**M**i persone ne estas politikulo aŭ militestro. Eble pro tio mi ne komprenas, kial la prezidento Macron decidis donaci la veturŝlosilon de la lando al faŝistoj. Ĉu li estas makiavela? Eble. Sed verŝajne Makiavelo ne estis tiel stulta! Krom tio, ĉu eblas konsideri, ke Macron estus pensulo? Li estas nur la ludilo de miliarduloj, tiuj, kiuj instalas lin dank' al povo de propagandaparatoj financataj de ili. Same faris siatempe Kaligulo, kiam li nomis sian ĉevalon senatano. Sed, ĉu necesas studi ĉevalan psikologion? Ni prefere demandus, kio konvinkas plurajn milionojn da personoj akcepti esti registrataj de ŝtato estrita de ĉevalaĉo.

Ĉiutage mi sentas min pli anarkiista, kiam mi aŭdas «Mi decidis redoni al vi la elektkapablon». Mi miras! Kiel eblas prononci tiajn stultaĵojn? Kvazaŭ mia elektokapablo dependas de lia bonvolo! Kvazaŭ mia libereco estus rezulto de lia aŭtoritateco! Mi ŝatus respondi «Mi decidis piedfrapi vian postaĵon!» Sed same, kiam maldekstrulino asertas, ke ŝi fieras pri la popolo, kiun ŝi kredas reprezenti, mi ankaŭ miras! Kiu donis al ŝi la rajton fieri pri mi? Same, plian fojon, kiam alia politikulo nepre volas doni al mi amon, korinklinon, lasu min trankvili, mi petas.

Resume, voĉdoni ĉiam estas donaci la veturŝlosilon al iu, kiu parolos mianome kaj eventuale agos malagnoskante siajn promesojn. La leĝoj de nia konstitucio ebligas tion. Vi relegu la artikolon 27an de tiu konstitucio. La mandatoj de la politikuloj estas *representcelaj*. Tio estas la malo de demokratio. Nur *deviga mandato* ŝuldigas. Tiel estis dum la Komunumo de Parizo en 1871. Sed tiam la popolo okupiĝis pri siaj aferoj. Ĝi eĉ invadis la preĝejojn, instalante en ili «revoluciajn klubojn». Ni jam parolis pri tio lastsemajne. Dum tiuj renkontiĝoj

floris senĉese kontraŭdiraj debatoj. Ĉar demokratio povas nur ekzisti, kiam ekzistas kontraŭdiraj debatoj. Kaj ankaŭ kiam ideoj konfliktoj ne iĝas personaj konfliktoj. Ne ĉiam facile! Afero pri edukado, ĉu ne? Ĉu ne estas la ĉefa rolo de lernejo?

Fine, ni ne forgesu, ke nia nuna periodo estas malkvietiga, eĉ senesperiga... Sendube ni estas malfortaj. Sed ni ankaŭ ne forgesu, ke la friponoj, kiuj estras nin, tiuj friponoj estas multe pli malfortaj ol ni, se ni decidus agi. Kiel dirite en la kanto La Internacio «Se tiuj hommanĝantoj volas heroigi nin, ili rapide povus scii, ke niaj kugloj same trafos niajn proprajn generalojn!»

Do, ni voĉdonu, kial ne?, kaj persone mi faros, sed estas nur propra sinteno, sed mi faru tiel kondiĉe, ke ni faru tion SAMTEMPE sed neniel oni forgesu, ke estas aliaj aferoj farendaj! Ni eble voĉdonu sed por bremsi eble tiun aferon sed neniel anstataŭ.

Volito Ternant  
SAT-membro 29738



*Hubert, Guy kaj **Volito** animas elsendon Radio Esperanto ĉiun vendredon inter la 17a kaj la 19a30*

[https://www.radio-libertaire.org/podcast/z\\_commun/emission\\_aff.php?id\\_e=50&id\\_c=41&bout=alpha](https://www.radio-libertaire.org/podcast/z_commun/emission_aff.php?id_e=50&id_c=41&bout=alpha)

*Tajpis Marcelo*

**ESTRARO**  
**de**  
**«ESPÉRANTO-GIRONDE»**

\* \* \* \* \*

Adreso ĉe la prezidanto

\* \* \* \* \*

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**  
Université de Bordeaux Montaigne

UFR Langues,

Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,  
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / [canonica.elvezio@orange.fr](mailto:canonica.elvezio@orange.fr)

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 07 46 / [janinedum@neuf.fr](mailto:janinedum@neuf.fr)

Kasisto: **Yannick DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 06 84 11 26 95 / [yannickdum@aol.com](mailto:yannickdum@aol.com)

\* \* \* \* \*

**Kontribuojn por LEGI bv. sendi al [janinedum@neuf.fr](mailto:janinedum@neuf.fr)  
aŭ al [esperanto.gironde@free.fr](mailto:esperanto.gironde@free.fr)**

**NIAJ KURSOJ**

- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono G-207, ĉiun merkredon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

- En **SAINT-GENÈS DE LOUBÈS**, nun la kursoj okazas laŭ nedefinita horaro, ĉar ni estas tre malmultaj, kaj inter ni estas infanoj. La sekva kurso okazos sabaton la 23-an de marto je la 10a15, ĉe Jean-François kaj Iberla, kun Klodin' kaj Marcelo. Se estos aliaj homoj, ni disponos pri komunuma ĉambro.

Por informiĝi: [gemesperanto@gmail.com](mailto:gemesperanto@gmail.com) aŭ 06 60 18 28 66.

